

# Lingvo Internacia

Duonmonata organo en Esperanto

Redakcio kaj administracio : PARIS, 5-e Arr., 33, rue Lacépède, 33

I februaro 1905

<b>Nesciulo</b> : La ĉiela bluo . . . . .	49
<b>Leo Belmont</b> : Azrah (versajo de <i>Heine</i> ) . . . . .	52
<b>Kuracisto</b> : En la vagonaro . . . . .	53
<b>Miksajoj</b> : « Kunvivi kiel hundo kaj kato ». — El la malproksima estonteco. — Bagateloj . . . . .	56
<b>Tra la mondo Esperantista</b> : La Kongreso en Boulogne-sur-Mer . . . . .	59
<b>Movado Esperantista</b> . — <b>H. K. B.</b> : Bohema kroniko . . . . .	61
<b>Legamulo kaj G. Queste</b> : Bibliografio . . . . .	62
<b>Diversajoj</b> : Letero de Doktoro Zamenhof . . . . .	68
<b>A. Dombrovski</b> : Litvo aŭ Litovo? . . . . .	69
<b>Th. Cart</b> : Respondeto je la letero de S-ro Carlo Bourlet . . . . .	70
<b>Edward Metcalfe M. A. (Oxon)</b> : Poŝta danĝero . . . . .	71
<b>J. Coox</b> : Pri « adresi » . . . . .	72
<b>Problemoj</b> . . . . .	72
<b>Nia aldono literatura</b> : fino (25—36. paĝoj) de « La Horlo », tradukita de <b>Stellano</b> .	

## LA ĈIELA BLUO

(Senokupula babilado)

‘ Dum hela tago, kiam sennuba ĉielo kurbas super niaj kapoj sian belegan bluan arkaĵon, ofte okazas, ke scivolemulo demandas :

« Kial blua estas la ĉielo? »

Senidealuloj, nature praktikemaj, tuj rimarkas, ke tiu ĉi neniel influas al politiko aŭ valoro de financaĵoj; sekve tia koloro estas tute ne interesa.

Sed multaj aliaj, allogataj de la fenomenoj okazantaj en la senfinaĵo, malsame opinias.

Kredeble ili ne tute malpravas, ĉar, de ekstermemora tempo, famegaj scienculoj elmetis saman demandon :

« Kial blua estas la ĉielo? »

Jam en XV-a jarcento serĉis klarigon **LEONARDO VINCI**, tiu universala spirito, kiu, tiel diri,

atakis ĉiujn problemojn. Li aljuĝis tiun ĉi koloron al miksiĝo de blanka suna lumo, resendata de superaj tavoloj de l'aero, kun la densega nigraĵo de la netrapenetrebla spaco.

Granda NEWTON siavice priinteresiĝis. Laŭ lia opinio, la koloro de la ĉielo devenus de rebrilo de suna lumo ĉe akvogutetoj entenataj en aero.

Certe alloga estis tiu ĉi teorio. Sed alia scienculo, CLAUDIUS, renversis ĝin en 1847-a jaro. Tiu ĉi kalkululo rimarkis, ke se l'aero estus plenigita per akvobuletoj, la optikaj aparatoj ilin treege dikigus kaj montrus al ni en la spaco aregojn da sunoj!

En 1869-a jaro, TYNDALL elmetis komprenon pli ĝustan kaj apogatan sur fenomenoj nomataj «polarizo de la lumo» kaj «ilumino de la vaporoj».

Aliaj serĉuloj alskribis la kolorecon al transsendiĝo de sunaj vibroj tra la polvoriĉaĵo formata de nia atmosfero. Efektive, estas okulvidebla, ke Tero, kiel aliaj ĉielaj korpoj, rondiras kaj promenas tra polvonubo devenanta de ĝia dispecetiĝo kaj senĉesa balaiĝo de ventoj. Eble, eĉ kredinde, Suno, nia suno, elsendas radiojn *Röntgen*'ajn, nigrajn vibrojajn, kiuj rompiĝante tra la polvoturnaĵo, elvokus ĉe niaj okuloj pro nesciata kaŭzo, impreson de blueco.

Proksimume tiel, kun multe da apudaj, implikaj kaj malnetaj sciencaj konsideroj, la «polvistoj» klarigas la bluecon de la ĉielo.

Sed ekzistas ankaŭ «kontraŭpolvistoj» kiuj tute ne tion ĉi konsentas. S-ro W. SPRING, profesoro en la Lieĝa Universitato, resumis iliajn argumentojn ĉe kongreso de la *Svisa Societo de Naturaj Sciencoj*.

Laŭ S-ro SPRING, polvoj malheligas la brilon de l'bluo anstataŭ ĝin elvoki: ju malpli estus polvoj ĉe la rigarda direkto, des pli blua aperus la ĉielo. Ĝi estas teorio, «pri pureco» tre logika, se —

irante de la simpla al la malsimpla — oni taksas la fenomenojn larĝege okazantajn en la spaco komparante ilin kun tiuj, malgrandegaj kaj malnoblaj, okazantaj en niaj surteraj loĝejoj, kiam, en puriga celo, ni tie faras tro multe da balailbatoj.

La lieĝa scienculo eldiras do, ke ĉiuj bluaj ŝajnaĵoj observataj de ni estas klarigeblaj kaj eĉ kalkuleblaj matematike, se ni atentigas la solan aĵon «fluidan oksigenon».

Efektive, oni antaŭ nelonge prosperis industrie fluidigi la aeron.

Sed, kiam tia ĉi aero, elfluas, transversigas en la fabrikaj aparatoj, ĝi aperas, kiel havanta belegan bluegan koloron, kapablan ĝojigi ĉiujn pentristojn kaj revivigi ĉiujn poetojn. Oni do povas demandi, ĉu tiaj polvoj, kiaj estas en la spaco, Tero kaj ceteraj planedoj, ne estus ĉirkaŭataj de bulforma atmosfero, kiu ebligus ilian naĝadon en ĉiela oceano da bluega fluida oksigeno aŭ aero?

Fenomeno nomata de fizikistoj «kalefacio» liveras ĉirkaŭecan figuron por tiu ĉi supozo. Se oni ĵetas akvoguton sur ruĝigitan metalplataĵon, anstataŭ subite disvaporigi, la guto buliĝas, turniĝas rapidege super la plataĵo, de kiu ĝi estas apartigata per gasa ujo elasta kaj ŝirmema : ĝi estas en stato «kugloforma». Se la metalo malvarmiĝas, kuntuŝo fariĝas kun la fluidaĵo, la kugloformeco malaperas kaj la bulo eksplodas.

En ĉiu akvoguto certe estas mikroboj, «malgrandeguloj». Imagu ni, ke ili havas prudenton. Dum la tempo — longa por ili — kiam la guto turnegiĝis super la varmaĵo, ili vivis en sia disstretita atmosfero kaj eble multegiĝis; ili ekvidis la ruĝecon de la metala plataĵo, kaj nomis ĝin «sia suno»! kaj ĉio daŭris unu momenton, sed tiu ĉi momento ŝajnis esti jarcentoj por tiuj malgrandeguloj, kiuj ĝin mezuris laŭ horloĝo de sia mallon-

gega ekzisto. Post ĉeso de la kalefacio, la guto tuŝis la varman plataĵon, disrompiĝis, malaperis, kaj la mikroboj disiĝis tra la spaco, eble sin demandante : « kial nia ĉielo estas blua? » Ni estos tie por respondi al ili : sed kiam ni metas la saman demandon al ni mem, ankaŭ malgrandeguloj, kiu respondos?

NESCIULO



## Azrah

— EL HEINE —

Ĉiutage promenadis  
De sultan' filin' belega  
Je l'vespero, ĉe fontano,  
Kie blankaj akvoj plaŭdas...


Ĉiutage juna sklavo  
Ĉe fontan' vespere staris;  
Kie blankaj akvoj plaŭdas... —  
Ĉiutage pli paliĝis...

Unufoje principidino  
Ĵetis al li tri demandojn :  
Aŭdu! volas mi ekkoni  
Vian nomon, teron, genton...

Kaj al ŝi respondis sklavo :  
Nom' — Machmed'; el tero — Jemen;  
Mia gento — tiuj Azrah,  
Kiuj mortas, kiam amas...

Esperantigis Leo Belmont





## EN LA VAGONARO

Ĝis la lasta momento mi ne kredis je mia forveturo en malproksiman Orienton. La konstanta akompanado de kolegoj tiel kutimigis min al la ĉesto en stacidomo fervoja, ke eĉ nun ŝajnis al mi, ke denove mi akompanas miajn kolegojn, des pli ke kune kun mi preparis sin al forveturo ankaŭ du aliaj kolegoj.

La veran efektivecon mi eksentis nur kiam post longa adiaŭado kun parencoj kaj konatuloj mi enpaŝis la vagonon.

Lasta sonoro. Lasta daŭra ekkrio de adiaŭ. La vagonaro malrapide komencis elŝiradi nin el la brakoj de nia hejma urbo, el vivaj hejmaj rememoroj. Longan tempon alnajligita al fenestro mi trapikis per mia rigardo ĉiujn detalojn, penante forĝi en la memoro ĉiujn bagatelaĵojn, kiujn en aliaj kondiĉoj mi sendube traveturus seninterese. La vespero estis belega. La luno preskaŭ en pleneo riĉe lumigis la teron kovritan de malŝargâ nega kovrilo, kiu per mil ŝanĝantaj briletoj respondis al la afabla, trankvila rideto de l'luno. La aero estis neordinare pura, la vagonaro rapide iris en malproksimajn spacojn kvazaŭ volus elŝiri nin el la mezaĵo, kun kiu kvazaŭ ĉeno ligis nin ĉiu penso kaj freŝaj memoroj.

Ni trapasis la ĉirkaŭaĵojn de Varsovio.

En la luma brilo dissterniĝis antaŭ niaj okuloj senfino da kampoj kaj nudaj interspacoj. Malrapide forŝirata de la rememoroj je hejmo, mi komencis kontraŭvole revii pri la plej proksima estonteco.

Per forto elkaptitajn el nia ĉiutaga vivo, rapide forportis nin la sorto en la malproksimegan angulon de l'tero al neniu el ni bezona, sur la pecon da

tero, en kiu sendube neniam starus nia piedo, se la sensatiĝema avido homa volus kvietigi siajn sangavidajn instinktojn.

De dek monatoj daŭras jam terura, sovaĝa idola oferado al moloko de l' milito : miloj da homoj elŝiritaj per senkompatema mano el siaj karaj mezaĵoj iras trapiki siajn fratojn por fine mem pereji de fratmortiganta mano ! Miloj da homoj sub standardo de Dio iras verŝadi per riveroj la sangon de siaj proksimuloj, semi la pereon kaj neniigi la revojn, detruji la vivon de tutaj familioj, forŝiri bantantajn je amo kaj revoj korojn.

La homa hipokrizio aldonas al ĉi-tiu sovaĝa tranĉado la formon de l' sankta afero. La kunbatalantoj petas Dion per solenaj preĝoj pri la venko, pri la sukceso en siaj mortigaj sangaj krimoj. La estroj ĉirkaŭigas sin de sanktaj pentraĵoj. Antaŭ ĉiu batalo la pastroj traversas per si la Dian benon sur ĉi tiuj, kiuj tuj iros verŝi la sangon de iliaj fratoj. Eĉ kuracistoj, kies ĉefa tasko en la milito devas esti la malgrandigo de doloroj kaj malmultigo de mortoferoj, kontraŭvole fariĝas sanga ilo en la manoj de batalantoj, kiuj sin servas je ni por la rebonigo de la difektita materialo milita el korpo homa. Bela kaj nobla nia tasko fariĝas do en tiu ĉi sovaĝa orgio, unu ĉenero en la granda ĉeno, kiu en sian mortigan amplekson kaptas de tempo al tempo senkulpajn amasojn de l' homaro.

La pensoj unu la aliajn puŝis en mia cerbo. Malgajaj ne de mia propra flanko, malgajaj de ilia malluma enhavo, tiel klara kaj tiel nekomprenebla de tiuj en la manoj de kiuj restas nun la potenco sur multaj miloj da homaj vivoj. . .

Ni haltiĝis en la plej proksima stacio.

Amaseto da homoj, kiujn mi ekvidis el la fe-

nestro, forpuŝis por momento la vicon da trudaj pensoj.

Mi enpasis la vagonkupeon.

En malluma angulo sidis apogante sin sur la amaso en senordo ĵetitaj vojaĝobjektoj unu el la kolegoj kune kun mi alvokitaj al la milito. Li forlasis en Varsovio junan edzinon, dekkelkjaran, malfacile akiritan praktikon, vicon da revoj pri la vivo, kiu nur en la lasta tempo komencis sin por li efektive. Oni alvokis lin en la regimenton por vico da malgajaj ŝargaj provoj kiel atestonton kaj eble kunhelpon en teruraj fratmortigantaj krimoj. La tria kolego per sia humoro tutigis la malgajan harmonian trion de nia kupeo. Mi ne kuraĝis kaj ne volis dispeli la malĝojon de miaj kolegoj, kvankam mi mem kvietigis iom la unuajn impresojn kaj paciĝis kun la severa efektiveco.

Mi denove eniris la koridoron al la fenestro.

La vagonaro iris unutone, ekbatadante kvazaŭ horloĝo, iafoje ekpuŝante aŭ subite balancante la vagonon.

La ekĝemoj de la lokomotivo kiujn konstante akompanadis la tentado de l'fenestroj aldonis al la vespera kvieteco malgajan impreson, kiun pligrandigis ankaŭ la mallumo de nia vagono avare lumigata de unu kandelo.

Ni trapasis jam la ĉirkaŭaĵon riĉe kovritan de l'neĝo.

Apudvojaj arboj en la lumo de l'luna nokto staris kovritaj de blanka vualo dormiĝantaj de l'facila vento.

Unu post alia forkuris antaŭ ni lumetoj lanternaj. Ankoraŭ longe mi rigardis en malproksimegon nenion jam pensanta, sole per lacaj okuloj admiranta la belecon de l'luma vintra nokto.

Fine lacigita ni revenis en la kupeon.

La kolegoj jam laboris pri ordigo de siaj objektoj. Komencis la parolado kaj baldaŭ ni revenis al nia ĉiutaga humoro, preskaŭ tute forgesinte la lastajn en Varsovio kaj la unuajn en nia nova vivo impresojn.

KURACISTO

## MIKSAĴOJ

« **Kunvivi kiel hundo kaj kato.** » Kiam oni alportis katineton, timigitan, kurantan tien ĉi kaj tien, kun levita vosto, kaj plendaj miaŭoj, Diano unue konsideris ĝin, kiel strangan estaĵon erariĝintan en sian bienon; la hundino, kun oreloj duone levitaj, la kapo klinita, ĝin surprize rigardadis mirante pri la irado de l'besteto.

Tiu ĉi, vidante sian naturan malamikon, streĉis la ungojn, kurbigis la dorson, starigis la harojn kaj, kolere, terure kraĉis pff... pff...

La hundino ekscitata, amuzata, flanken saltetis, platiĝis teren, bojante, preta mordeti aŭ ruligi la katinon per sia dika piedo. Sed, ĝi tre humila fariĝis, svingis la voston, movis la postajojn, kiam ĝi vidis la kuirstinon, kiu prenis sur siajn genuojn, karesis, konsolis la katineton, dolĉe parolante; kaj precipe kiam ŝi forpelis ĝin por meti la besteton antaŭ teletron plenan de lakto.

Diano pripensas, ke tiu ĉi besto, malgraŭ ĝia malgrandeco, estiminda persono estas, ĉar oni tiel amike zorgas al ĝi; tiam, la hundino, indiferece sidiĝas antaŭ la kamenon.

Post du tagoj, ili kutimis unu la alian; tre seriozaj, ambaŭ sin varmigis antaŭ la fajro, kaj, ĉar estas malvarme, nun alproksimiĝas unu la alian. La hundino ekdormante, malsevera, eĉ protektema rigardadis, per duone fermitaj okuloj, la katineton, kuŝantan antaŭ ŝi. Eĉ Diano ĝin flaris, serĉadis ĝiajn pulojn; per la rigardo, patrine, sekvis ĝiajn ludojn.

Vespere, la katineto kuŝis inter kruroj de la servema hundino, kaj ili kune varme dormadis.

Poste alvenis la ama sezono; ho ve! La katino forlasis amiketon kaj hejmon; Diano, nefilozofa pri sendankeco, iafoje



elĵetis malĝojajn ekĝemojn post kiuj ĝi lasis sin al dormo. Tiam la katineto pliamis la lunan lumon, la tegmentojn aŭ aleojn de l'ĝardeno.

Iam fine la forlasantino revenis; ĝi multepeze sin trenis, ĉiupaŝe haltis; kompatema Diano akceptis ĝin kore. Estis vespero; la unua parto de la nokto estis kvieta; poste la katino svingiĝis, Diano malkvieta ekĝemis; matene, kiam la tagiĝo aperis, kia ne estis la mirego de la hundino vidanta, anstataŭ unu katinon, tutan idan familion rampantan meze de ĝiaj piedoj! Sed, unue tre enuita, la hundino tamen akceptis la situacion kaj, kiel ĝi amis la patrinon, tiel ĝi amis la idojn.

Kial oni diras: «Kunvivi kiel hundo kaj kato?»

L. BALLEREAU

**El la malproksima estonteco.** En «Moderna Utopio», nun aperanta en *Fortnightly Magazine* kaj *La Revue*, la angla imagisto H. G. WELLS skribas science fantazian priskribon de la evoluado de homaro imagita vivanta sur iu stelo preter *Sirius*. La aŭtoro al si mem kondiĉis, ke tiu homaro havu saman vivkondiĉaron kiel ni surteruloj, sed ĉar ĝi estas multege pli progresema ol nia homaro, li tamen povas antaŭenlasi sian fantaziemon laŭ sia plaĉo. Jen kion li skribas pri dormoĉambro en Utopia gastejo:

«La ĉambro estas, kompreneble, tre klara kaj pura kaj simpla; tamen neniel malkare provizita, sed kombinita por ŝpari kiel eble plej multe laboron pro litzorgado kaj riparado. Ĝi estas bele proporciita, kaj iom pli malalta ol plejmultaj ĉambroj surteraj de mi konataj. Ne estas fajrejo, kio min embarasas ĝis mi trovas termometron apud ses elektrokranoj (komutatoroj) sur la muro. Super tiu ĉi kranaro estas mallonga instrukcio: unu krano hejtas la plankon, kiu ne surhavas tapiŝon sed estas kovrita per substanco simila al mola vakstolo; unu varmigas la matracon, kiu estas el metalo, kun trafadenitaj rezistbobenoj; kaj la aliaj varmigas la muron diversgrade, ĉiu direktante la elektran fluon tra aparta sistemo da rezistiloj. La fenestra kadro ne estas malfermebla, sed super ĝi, samnivela kun la plafono, senbrua rapida ventumilo pompas l'aeron el la ĉambro. La aero eniras la ĉambroon per TOBIN'a ventoltubo. Estas alkova vestejo, provizita je bano kaj ĉio necesa por la tualetto, kaj la akvo estas hejtebla, se oni deziras, per fluigo tra elektre varmigata spirala

tubo. Per movo de turnilo, peco de sapo elfalas el konservmaŝino, kaj kiam oni ĝin ne bezonas plu, oni ĝin lasas fali kune kun siaj uzitaj viŝtukoj k. c., kiuj ankaŭ estas liveritaj de maŝinoj, en malgrandan skatolon, tra kies fundo ili tuj falas kaj forglitas malsupren laŭ glata klinita puto. Mura avizeto informas pri la prezo de l'ĉambro, kaj vi sciigas ke la prezo estos duobligata, se vi ne lasos la tualeton tian, kian vi ĝin trovis. Apud la lito, kaj lumigebla nokte per oportuna elektra krano super la kapkuseno, estas malgranda horloĝo, kun ciferplato samnivela kŭn la muro. La ĉambro ne havas angulojn emajn alkolekti polvon : muro renkontas plankon laŭ grada kurbo, kaj la ĉambro povus efike elbalaigi per kelkaj ĉirkaŭfrotoj de mekanika balailo. La kadroj de l'pordoj kaj de l'fenestroj estas el metalo, rondigitaj, kaj nepenetreblaj kontraŭ aerfluoĵ. Avizo ĝentile petas, ke vi turnu tenilon ĉe l'piedo de la lito antaŭ ol foriri el la ĉambro, kaj tuj la litkadro suprenturnas ĝis vertikaleco kaj la litaĵoj pendas aerumate. Vi staras ĉe la litpiedo kaj konscias, ke ne estas farota de iu eĉ minuto da laboro. Memoroj pri la malbonodora senordeco de multa tera dormoĉambro post ununokta uzo pasas tra via penso . . . »

Trad. W. MANN

**Nerebonigebla.** — *La patrino* : Mia filo, vi estas jam deksep-jara, kaj via konduto estas kiel tiu de malbona infano. Vere, se vi tiel daŭrigos, mi devos dungi edukiston por vi . . . — *La filo* : Kara mia patrino, mi preferus — edukistinon.

**La sonĝo.** — « Amiko, imagu, en la pasinta nokto mi sonĝis pri vi : mi sonĝis, ke mi estis en la ĉefurbo, tie mi renkontis vin, kaj vi regalis min per vespermangŝo. Mi tuj sciis, ke tio ĉi estas nur sonĝo. »

**Malvasta pantalono.** — *Rekruto* : Sinjoro serĝento, tiu ĉi pantalono estas malvasta por mi. — *Serĝento* : Tio ĉi ne estas vera. (AL LA KAPORALO :) donigu nur duonporcion da nutraĵo al tiu ĉi homo !

**Deziro ĝentila.** — « Mia kara edzino, lasu ke oni pentru vian portreton sur mian pipon. »

— Kial do, mia kara edzo ?

« Tio ĉi helpas al mi por ĉesi la fumadon. »

**En la strato.** — *Mizerulo* : Volu, mi petegas, doni al mi almozon. — *La sinjoro* : Bedaŭrinde mi nenion havas. — *La mizerulo* : Se vi nenion havas, ne promenu en la strato, sed laboru !

# TRA LA MONDO ESPERANTISTA

## La Kongreso en Boulogne-sur-Mer.

La kongreso komencos oficiale la 5-an de aŭgusto.

La 5-an, 6-an, 7-an tagojn, seriozaj laboroj.

La 8-an, 9-an, grandaj festaj kunvenoj kun vestaĵojnaciaj.

La sekvantajn tagojn, amuzaj kaj ekskursoj.

La libreto kun ĉiuj detaloj kaj planoj de la urbo estos presita. La sciigoj estos tre facile diskonigataj ĉar en la kunveno kongresa staros sencese oficistoj kiuj ĉiutagan programon klarigos, ŝanĝos la fremdan monon kaj vendos la esperantajn librojn kaj produktaĵojn. Daŭra ekspozicio estos aranĝata de nia amiko Deligny, la sindonema profesoro de Saint-Omer. — Sekcioj apartaj pri la diversaj laboroj, preparos la demandojn por la ĝeneralaj kunsidoj, aŭ plenumigos ekzamenojn, ktp.

Ni petas ke ĉiuj aliĝantoj sendu kiel eble plej frue siajn dokumentojn aŭ projektojn, speciale teatraĵojn, ĉar ni deziras ke multaj fremduloj povu ludi ian parton.

— A. MICHAUX, 26, rue Wissocq.

**Calais.** — La sindonema sekretario, S-ro Carpentier skribas :

« Mi plezure sciigas al vi, ke en sia lasta kunveno la Komitato decidis oficiale sin reprezentigi en la Kongreso Esperantista 1905-a per dek elektotaj delegatoj. Mido sendas al vi entenate mandaton da tridek frankoj, por ke vi sendu al mi la dek kartojn de la delegatoj.

« Kompreneble tio ĉi estas aparta mendo de la Grupo ĉar mi povas tute certigi vin pri la alveno en Boulogne por la kongresa festo de multe da aliaj amikoj esperantistaj aŭ ne, sed tre eble esperantistigemaj. »

**Valencia.** — De S-ro Guinart :

« En kunsido de la Direktanta Komitato de Hispana Societo pro propagando de Esperanto oni decidis, tutkore aliĝi al Esperantista Kongreso organizota en Boulogne-sur-Mer.

« Respondante al la invito kiun faris al ni la Franca Societo kaj aliaj, plezure ni sendas al vi tiun aliĝon, kaj la esprimon de nia deziro helpi vin laŭ niaj fortoj. Ĝis nun ni nur scias ke ĉeestos S-roj Ricardo Codorniu, prezidanto de H. S.; kaj Norman Maclean, prezidanto de la Murcia Grupo kaj A. Jimenez Loira, direktoro de *Suno Hispana*. »

**London.** — La direktoro de la « *Chronique* » kiu afable akceptis niajn artikolojn pri Esperanto, sendas afablan leteron por aliĝi al Kongreso kien li akompanos multajn legantojn de la interesa Londona ĵurnalo.

**Catalunya.** — S-ro Paul Berthelot, de Céret (P.-O.) sendis aliĝon je la nomo de « Alplech Esperantista de Catalunya » kaj proponis vesperon en kiu ĉiu delegato devus esti en nacia vestaĵo: « Se vi akceptus tiun ideon mi promesas fari eblon por ke nia Grupo sendos en Boulogne gekatalunjanojn en naciaj vestaĵoj kun siaj tipaj ĉapeloj tre rimarkindaj ».

**La Commanderie (Loiret).** — S-ro Paul Chapellier petis karton por la Kongreso kvankam li ne estas nia samideano. Li estas aŭtoro de projekto pri *l'alliance des deux langues* (deviga lernigo al ĉiuj personoj de lingvoj angla kaj franca). Ni esperu ke li lernos esperanton por interparoli kun la Kongresanoj kies plejmulto konas nek francan nek anglan lingvojn.

*La Grupoj en Dover, La Rochelle, Lyon, Le Havre, Reims, Rouen, Calais, Grenoble, Auxerre, Clermont-Ferrand, Nice* — sendos multajn delegatojn.

**Sainte Hyacinthe (Canada).** — Nia korespondanto S-ro Bouchard sendas tre agrablan sciigon. « Mi intencas iri kaj estas certa, ke multe da kanadanoj venos. »

**Liège.** — La Grupo esperantista decidis aliĝi al la Kongreso per la sendo de sia prezidanto.

S-ro Sloutzki, sekretario, venos kune kun multaj Belgoj.

**Monako.** — La Grupo de *Monako* donas tutkore sian aliĝon por la Kongreso esperanta en 1905 organizota en Boulogne.

**Sens.** — S-ro Deshays alkondukos sian Grupon kaj verkos specialan himnon al Zamenhof kun helpo de S-ro de Menil ;

li aranĝos poemon kaj muzikon presotan de Hachette, por voĉoj kaj granda horo.

**Alger.** — Nia amiko, prezidanto de Afrika esperantistaro, S-ro Capé, venos kun amikoj kaj prunte donos al nia Kongreso multajn verkojn de la mirinda ekspozicio kiun li malfermos baldaŭ.

**Beaune.** — Tiu Grupo diras ke ĝi aliĝas *tutkore* al Kongreso al kiu ĝi deziras la plej grandan sukceson. Tiu grupo esperas kun ni vizitadi *Bruges, Anvers, Bruxelles, Liège*, kaj ĝia ekspozicio. Beaun'a Grupo proponas mendi specialajn vagonarojn por la vojaĝo.

Komunikita de la Grupo en Boulogne.

(Daŭrigota).

## MOVADO ESPERANTISTA

### Bohema

**Esperantista klubo en Praha** fondis du filiojn sub oficialaj titoloj: « Unua virina grupo de Esperantista klubo en Praha » kies anoj estas vizitantinoj de kursoj faritaj en « Muzeo de Náprstek » de S-ro Kühnl kaj « Grupo de Esperantista klubo en Praha por Plzen kaj ĉirkaŭaĵo » kies anoj estas vizitantoj de kursoj faritaj en Plzen de S-ro Kutilek.

**Kursoj en Praha** estas farataj en « Virina klubo amerika-bohema » en « bohema virina klubo » (*du paralelaj kursoj*) kaj en « Problindula instituto de Klár. »

**Studenta rondeto esperantista** ekzistas en Klatovy (Bohemujo). Ĝi estas fondita kaj direktata de S-ro Nohejl.

**Centra societo de bohemaj instruistoj** estas tre favora por nia lingvo dank' al penado de S-ro Alferi, kiu en societo parolis por nia lingvo. La komitato promesis publikigadi artikolojn pri nia afero en societaj gazetoj kaj broŝuroj. Ĝi intencas organizi grandan korespondadon internacian pri lernejoj aferoj.

**Inter gazetaj artikoloj** estas rimarkindaj tiuj en *Lidové Zájmy* (parolado de S-ro Kajš en societo en Brno), en *V Boj* (granda felietono en 5 n-roj), en *Sŭmavan* (de No

hejl), en *Plzensky obzor* kaj *Plzeňské listy* (notizojn pri kursoj de S-ro Kutilek kaj pri fondo de grupo en Plzen) kaj fine la tradukoj en *Česky učitel* (Esperanto kaj pedagogio tradukita el The Esperantist farita de S-ro Khun), en *Rozhledy lidumilné* (« Sava Armeo » el « Lingvo Internacia » de S-ro Riegl). Krom tio bohema filozofia gazeto *Česká Mysl* raportas pri parolado de prof. Mansion, kiu en « Académie royale de Belgique » parolis pri lingvo internacia kaj esprimis opinion, ke estos internacia lingvo nek analitika latino de Tomo Akvin, nek botanika latino de Linné nek Volapük aŭ Esperanto (?), sed « Latino sine flexione » de prof. Peano. Karakteriza estas, ke similaj gazetoj tute silentas pri nia afero, sed tre volonte parolas pri aliaj sistemoj kiaj ajn ili estas. Tio havas difinan celon : montradi, ke nia lingvo ne estas lerninda, ĉar ĝi povas esti subpremita de aliaj lingvoj. Tiel batalas kontraŭ ni, ĉar ili ne havas seriozajn argumentojn kontraŭ ni !

**Kontraŭ Esperanto** parolas bohema filozofo prof. dr. Masaryk en sia parolado « Nacia filozofio de plej novaj tempo » kun kiu trakuradas Bohemujon, parolante en ĉiuj ĉefa urboj. En raporto pri tiu parolado ni legas tiujn perlojn : « Ek-igis bezono de lingvo internacia. Ĝi ekzistis kaj ekzistas (anglajo, rusajo) artefarite ĝi ne estas konstruebla. Tiu Volapük kaj Esperanto estas la lingvoj malvivaj (!?). Konstrui la lingvon tutslavan estas naiva... » Estas necese aldoni, ke prof. Masaryk tute nenion, sed absolute nenion scias pri problemo de lingvo internacia kaj des malpli pri Esperanto, sed estas ankaŭ, konfesinda, ke li havas grandan influon je certa partio bohema, kiu sendispute akceptas liajn eldiraĵojn. Tial li estas danĝera malamiko.

— H. K. B.

## BIBLIOGRAFIO

**Kondukanto de l'interparolado kaj korespondado kun aldonita Antologio Internacia;** ellaboris A. GRABOWSKI. Unu vol. da 184 paĝoj. Paris, *Hachette & K-o*. — 2 frankoj.

La redakcio de nia *Lingvo Internacia* petis, ke mi komencu tie ĉi serion da bibliografiaj studoj de kelkaj el la no-

vaj libroj Esperantaj. Mi konfesas — kvankam tio ĉi al mi estas granda honoro — ke mi ne tre ĝojis pro tia propono. Certe, zorga analizo de ĉefaj libroj el nia literaturo alportos, laŭ mia opinio, grandan helpon al nia afero. Unue la legantoj estos instigataj fari dum la legado rimarkojn, kiujn ofte sen tio ili ne faras; due, la aŭtoroj mem estos atentigataj pri kelkaj nerimarkitaj malbonetaj flankoj de iliaj verkoj, kaj povos pli facile ilin eviti en la estonto. Plibonigo de nia literaturo, plilertigo de nia legantaro, jen estas certe du ŝatindaj sekvoj de l'enkonduko de veraj bibliografiaj studoj anstataŭ la pli-malpli « reklamecaj » paragrafoj ĝis nun aperintaj en niaj gazetoj.

Sed — ĉar en plej bonaj aferoj troviĝas bedaŭrinde ia malfeliĉa « *sed* » — la verkanto de tiaj kritikoj bezonas esti vere fervorega kaj sindonema esperantisto, por sin ĵeti proprevole en teruran maron da riproĉaj, akraj plendoj, sekretaj malamikadoj, kiuj neeviteble falos sur lin post apero de plej negrava kritiko al ia verko : *kolerema gento poeta!*

Feliĉe, mi estas granda, malŝatinda malkuraĝulo; mi do sensanceliĝe konsentis la proponon de la redakcio de L. I. kaj — kaŝante min sub nigra vualo de sennomeco — decide alpaŝas mian unuan batalon!

Nebezone estas, tie ĉi eldiri, ke mi tute ne pretendas senerarecon de mia stilo aŭ opinio, sed nur parolas libere, « interamikece », celante nur la bonon de nia lingvo.

\*

ANTONI GRABOWSKI estas unu el la plej unuaj, — por ne diri la unua — el niaj verkintoj. Nenia vera esperantisto nescias — almenaŭ pro famo — pri la libretoj, kiujn li eldonis jam antaŭ dekkvar jaroj : *Kondukanto*, *La nega blovado*, *La nova jaro*, *Janko-Muzikanto*, kaj aliaj; intime mi ne parolas pri la multenombraj versaĵoj kaj prozaĵoj de li tradukitaj aŭ originale verkitaj, kiuj aperis en la gazeto « *Esperantisto* » tiam redaktata de D-ro Zamenhof. Unu el la plej belaj, *Virineto de l'Maro*, eĉ jam reaperis lastan jaron en ... sed, ŝŝtt!!... Sekreto estas ĝi...

Cetere, GRABOWSKI jam sufiĉe ofte kunlaboris de unu jaro je tiu ĉi gazeto, kie mi skribas nun, por ke miaj legantoj jam ne bezonu longan laŭdon pri li.

Bonegan ideon havis do la aŭtoro, kiam li reeldonigis siajn antaŭajn verkojn jam longe elĉerpi-tajn, des pli, ke komparo de lingvo kaj stilo de la diversaj rakontoj entenataj en la nova libreto estas tre instruanta.

Oni ja tie trovas — krom la « Kondukanto », aro da dialogojoj por vojaĝo, ktp. — rakontojn skribitajn antaŭ dek aŭ dek-kvar jaroj, kaj rakontojn tute freŝe verkitajn.

Mi rapidas diri, ke nur tre malgrandaj diferen-coj ekzistas inter la malnovaj kaj la novaj rakon-toj, escepte en la vortaro, kiu estas iom pli riĉa en la lastaj. Cetere la aŭtoro mem nin antaŭsciigas pri tio en sia antaŭparolo, dirante, ke « la Kondukanto kaj la tri unuaj rakontoj de la Antologio estis ver-kitaj, kiel tion ĉi montras iom la stilo, en la pe-riodo de la lingvo Esperanta, kiam ekzistis nur la unua lernolibro kun folia vortareto enhavanta ĉir-kaŭ 900 radikojn. Dank' al tiu ĉi propreco la ko-lekto estas tre facile legebla kaj povas eĉ nun servi bone al la komencantaj Esperantistoj, kiuj ne po-sedas ankoraŭ plene la lingvon. »

Tiu ĉi lasta rimarko de l'aŭtoro estas entute prava, kaj tial mi ne povas tro rekomendi lian ver-kon al tiuj legantoj, kiuj volus trovi en ĝi tre uti-lan kaj interesantan, legindan, ekzercaron. Krom la frazaro de la Kondukanto, kaj dialogoj el Gol-doni kaj Lukianos, la rakontoj de la Antologio li-veros al ili bonegan materialon, el kiu mi citos aparte *Estu benata*, de H. Sienkiewicz, *La simo de l'mondo*, de Boleslav Prus (ambaŭ jam aperis en antaŭaj jarkolektoj de L. I.), kaj precipe *Janko-Muzikanto*, tiu ĉi kortuŝanta, delikata rakonteto,



kiu restas ankoraŭ nun, dekkvin jaroj post apero de Esperanto, unu el plej belaj verkoj de nia literaturo.

La komencantoj trovos en tiuj rakontoj tre ŝatindan helpon precipe por traduko de diversaj esprimoj, ofte bezonataj en uzado de lingvo, sed ne ankoraŭ enskribitaj en niaj tro malgrandampleksaj vortaretoj. Anstataŭ eviti la idiotismojn kaj apartajn parolturnojn, GRABOWSKI kontraŭe ŝajnas ilin renkonti kun granda plezuro; kaj tio ĉi sola sufiĉus fari lian libron instruanta kaj utila por ĉiuj Esperantistoj.

Ĉu li ĉiam feliĉe prosperis en la tradukado de tiaj parolturnoj? Mi ne tiel opinias; kvankam multaj el ili estas brile kaj lerte elpensitaj, kelkaj aperas, kiel malfacile kompreneblaj aŭ ne akcepteblaj, kio certe ne estas miriga pro la malfacileco de tia tasko. Ekzemple apud bonegaj esprimoj *la veto staras* (p. 119), — *la domo staris malplena* (p. 111), — *la luno rebatis la fenestron en formo de granda luma kvadrato sur la kontraŭkusanta muro* (p. 112), — *voĉo de violonoj*, — *eta makulo*, — *kolonizi*, — *liaj enfalintaj vangoj*, — *nemezurebla malproksimo*, — *la kantoj sveladis grade* (p. 123), — *spikoj, kiujn tranĉas la vento* (p. 127), — *sen ia malfacilo*, — ktp. ktp., mi trovis aliajn, kiuj malpli plaĉis al mi kaj ŝajnas al mi ne imitindaj aŭ eĉ tute forĵetindaj. Ekzemple la frazo *homoj ne promesis al si, ke li vivos* (p. 109) anstataŭas la pli simplan *homoj ne esperis...*, — *li pensis al si* anstataŭ *li pensis*, — *Janko sur la kvaroj* (p. 113), — *... lin amis sia spece*, — *la patrino povus alatendi konsolon el li* (p. 109), — *li eĉ ne alatendos la bonfariston* (p. 107), — *li spiretadis, ĝis en la kvara jaro ie l'printempo la kukolo superkukolis (?) la*

*malsanon* (p. 108), — *regajni la parolon* (p. 131) anst. *aŭdi la parolon*, — k. a.

Diversaj uzoj de vortoj estas atentindaj. Ekzemple, mi trovis *la grava voĉo de la violonobaso* (p. 110) kie *grava* signifas « malalta, multvibra », *fable* (p. 118) je senco de la franca *fabuleusement* (legendinde), *Zeŭs havas malfortecon al Atene* (p. 118)!

Kelkaj novaj vortoj : *parantezo, formingo, hoplito, ĥleno, oriolo, ortiko, bardano, la ranoj kvakas, amforo, peripatetikisto*.

Rapidaj parolturnoj : *en la ĝardeneto, apud la domo, pepadis la paseroj, ke la ĉerizujoj tremis* (p. 109), — *si, preninte la infanon, superversadis ĝin per akvo, ke ĝi komencis fermadi la okuletojn* (p. 108).

Metaforoj : *la luno komencis veladi, kiel argenta sipeto, sur la ĉiela vastaĵo* (p. 118), — *la amo scias ennestigi eĉ en la koro de la patrono de komercistoj* (p. 119).

Oni antaŭvidos post tiu mallonga cito de ekzemploj, kia mino da esprimoj kaj parolturnoj estas la nova libro, per kiu nia pola samideano pliriĉigis nian literaturon. Li havas grandan meriton, ke li kuraĝe provis novajn uzojn kaj kombinojn de niaj vortoj : kaj tiel certe nia lingvo paŝos antaŭen kaj atingos la rangon de vera literatura lingvo, post multaj longatempaj provoj, el kiuj iom post iom defalos la malbonaĵoj por lasi la lokon nur al plej internaciaj formoj.

### Legamulo

#### **Premier manuel de la langue auxiliaire Esperanto.**

Tiu ĉi ruĝa libreto, kun figuro de la babela turo, estas majstre elpensita kaj verkita, kaj kokete eldonita. En kelkaj tagoj mi facile povis disdoni, aŭ pli ĝuste dire disvendi tridekon da ekzempleroj. Ĝi estas do certe bonega propagandilo por akiri al Esperanto novajn adeptojn.

Krom la erareto jam montrita aliloke pri la elparolado de *nj*, mi rimarkis dum la atenta tralegado de la libreto kelkajn lokojn, pri kiuj mi estus feliĉa havi la opiniojn de plirtajolmi.

1-e. Du fojojn la adjektivo *plena* havas post si la prepozicion *da*; sur la paĝo 13-a « *plena da esceptoj...* » kaj sur la paĝo 21-a « *plenan da antaŭjuĝoj...* ». Tia ekzemplo tre certe ne estas trovebla en *Hamleto*, nek en *Krestomatio*, nek en *Esperantaj Prozaĵoj*; nur en Internacia Scienca Revuo mi legis samajn esprimojn, kiujn mi konsideris ĝis nun kiel preserarojn. Efektive post la adjektivo *plena* oni ĉiam uzis la prepozicion *de* aŭ *je*. Pro kia kaŭzo ŝanĝi tiun uzadon?

2-e. Sur la paĝo 16-a trovas sin la vortoj *mastro* kaj *majstro* kun signifo, ŝajnas al mi, iom diferenca de la kutima. Ĉu iu povus doni ekzemplojn similajn el *Hamleto* aŭ *Krestomatio*?

3-e. Sur la paĝo 17-a ni legas *arestato* = un detenu: la franca vorto montras laŭ mia opinio homon, kiu *estis antaŭe arestata*, kaj tiu ĉi jam nun estas *homo arestita*. Tial mi opinias, ke estus pli ĝuste diri *arestito*.

Fine mi montros unu malfeliĉeton okazintan dum la presado: sur la paĝo 24-a la litero *i* elŝoviĝis el la linio 37-a *nfanojn* al la linio 31-a *ifariĝis*.

G. QUESTE  
Profesoro en Amiens



### Ricevitaj verkoj:

**Mia vilaĝo**, originala rakonto en lingvoj franca kaj esperanta, verkita de J. DELFOUR (kun du fotografiaĵoj): 60 centimoj. ✓

**Kato kun botoj**, de CH. PERRAULT, traduko kun apartigitaj elementoj de esperantaj vortoj (ilustrita): 50 centimoj. ✓

**Rakontoj de feinoj**, de CH. PERRAULT, traduko de S-RINO SARPY: 1 franko. ✓

**Die Entstehung der Esperanto-Sprache**, tradukita el Esperanto de P. CHRISTALLER: 15 centimoj. ✓

**Pri unu speco de kurbaj linioj koncernantaj la V-an Eŭklidan postulaton**, de A. DOMBROWSKI: 65 centimoj. ✓

**Trafendita Turo**, originala versaĵo en lingvoj franca kaj esperanta, de TH. CART : 25 centimoj (vendata por la blinduloj.)

La suprenomitaj libroj, kaj entute ĉiuj aliaj esperantaj, estas aĉeteblaj ĉe la *Preso Esperantista Societo*, 33, rue Lacépède, Paris. — Petu la detalan katalogon.



*Novaj Esperantaj gazetoj* aperis : **Germana Esperantisto**, ilustrita en lingvoj germana kaj esperanta, monata, jare 3 markoj; kaj **The British Esperantist**, en lingvoj angla kaj esperanta, monata, jare : 2,50 frankoj.

Oni abonas ĉe la supre donita adreso.

Pli detale ni priparolos ilin en venonta numero.

## DIVERSAĴOJ

*Ni ricevis la sekvantan leteron de nia estimata Majstro :*

*En la komenco de januaro mi ricevis de mia milita estraro la ordonon forveturi al la milito Mandjurujon kiel kuracisto; poste, pro la malforta stato de mia sano, oni min liberigis de tiu ĉi devo, kaj mi povas nun trankvile daŭrigi mian laboradon por nia afero. Pro la alvoko kaj poste pro la liberigo mi ricevis de ĉiuj flankoj tre multe da varmege amikaj kaj bondeziraj leteroj. Ne povante respondi al ĉiuj aparte, mi permesas al mi nun esprimi publike mian plej koran dankon al ĉiuj miaj amikaj korespondantoj.*

*Car multaj personoj intermiksas mian nomon kun la nomoj de miaj fratoj, kiuj ankaŭ estas kuracistoj kaj esperantistoj, tial — por averto de ĉia malkomprenigo — mi devas sciigi, ke la nomoj de miaj du fratoj, kiuj troviĝas nun en la milito, estas Leono kaj Aleksandro.*

*Ludoviko Lazaro Zamenhof.*

## Litvo aŭ litovo ?

En la n-ro 15 de « The Esperantist » (januaro 1905) mi trovis la rakonton de S-ro O. I. Elleder, ektitolitan : « Kiam ekfloras rezedoj, pentrajeto el rusa *Litvojo* ». La lastan nomon mi renkontas jam duan fojon en verkoj esperantaj. Ĉu ĝi estas regule esperantigita ? al tiu ĉi demando mi petas la instruitan esperantistaron turni sian atenton.

En la jaro 1890 eldonante por miaj samlandanoj lernolibron esperantan, nune jam elĉerpitan \*), mi unuan fojon estis alveninta al la demando : kiel oni devas diri en Esperanto mian patrujon : ĉu Litvojo aŭ iel alie ? Ne volante agi arbitre, mi serĉis la helpon en aliaj eŭropaj lingvoj. Por tiu ĉi mi preparis al mi la sekvantan tabelon :

<i>Lingvoj :</i>	<i>Nomoj de mia lando :</i>	<i>Nomoj de miaj samlandanoj :</i>
Rusa	Litva	Litovjec
Pola	Litva	Litvin
Latina	Lithuania	Lithuanus
Franca	Lithuanie	Lithuanien
Germana	Littauen	Littauer
Mia nacia	Lietuva	Lietuvis

El tiu ĉi tabelo mi ekvidis, ke ekzistas tri formoj de tiu sama radiko : 1) *Litv-* ; 2) *Litua-*, aŭ *Litaŭ-* ; 3) *Lituv-* aŭ *Litov-*. Kiun el ili elekti por Esperanto ?

La unua *Litv-* ŝajnis al mi netaŭga :

1-e, kiel tro mallongigita kaj tro malproksimiĝinta de nia nacia elparolado ;

2-e, kiel tute *slava* (rusa-pola) kaj tial nekonvenanta al lingvo Esperanto, kiu ja havas karakteron de lingvoj *romanaj* ;

3-e, kiel enhavanta sonon *-tv-*, en Esperanto tute neuzatan.

La dua formo : *Litua-* aŭ *Litaŭ-* ŝajnis al mi ankaŭ nekonvena, ĉar la vortoj : *Litua* aŭ *Litaŭo*, *Lituaŭjo* aŭ *Litaŭujo* estus malbone sonantaj pro multeco da kunigitaj vokaloj.

Tial restis la tria formo : *Lituv-* aŭ *Litov-*. Mi prenis la lastan aliformon : *Litov-*, ĉar la aliformo *Lituv-* farus la vor-

\*) Ĝi eliris ektitolita : *Lingvo internacia de D-ro Esperanto. Eldono litova. Tilzito 1890. Mokintuvc terptautisakos kalbos D-ro Esperanto. Tilzeje 1890*  
 Pp 62 in 16°.

ton *Lituvujo* ne sufiĉe bone sonantan pro dufoja ripeto de tiu sama vokalo *u*.

Enkondukita de mi radiko *Litov-* estis favore akceptita de la esperantistaro : ĝin enprenis S-ro Grabowski en sian « Liro »-n, S-roj Cart kaj Pagnier en sian lernolibron (« L'Esperanto en dix leçons »), S-ro J. Borel en sian « Vollständiges Lehrbuch der Esperanto-Sprache », S-ro H. Jürgensen en sian « Wörterbuch Esperanto-deutsch », fine nia Majstro mem, en sian « Fundamentan Krestomation ».

El tio ĉi mi kuraĝas konkludi, ke la radiko *Litov-* enkondukita en Esperanton antaŭ dekkvin jaroj, uzata en plej aŭtoritataj verkoj esperantaj, sufiĉe proksima al la latina radiko *Litua-*, kaj preskaŭ identa kun nia nacia elparolado (*Litovoj* = *Ljetuvja* aŭ *eĉ* en kelkaj niaj dialektoj = *Liftóvja*) estas jam vere internacia kaj devas resti en Esperanto por ĉiam.

Se do nia estimata Majstro aŭ ia alia aŭtoritata esperantisto trovus pli konvenan la novan radikon *Litv-*, volu publike sciigi la esperantistaron pri tio ĉi.

*A. Dombrovski*

*Profesoro de la Imperiestra katolika  
pastra Akademio en St.-Peterburgo*



## Kara ĉefredaktoro,

Ĉu respondeton vi volas akcepti post la tre interesa letero — interesaj estas ĉiuj niaj leteroj — de nia bonega kolego C. Bourlet?

Mi tre bedaŭras, ke, verkante la franc-esperantan vortareton, mi ne havis antaŭ la okuloj la anglan kaj germanan vortarojn. Mi certigas la prezidanton de Pariza grupo, ke, se tio estus okazinta, la sameco inter niaj vortaroj estus estinta tute plena. Kial do S-ro Bourlet ne pruntis al ni *en 1902* la fremdajn vortarojn? Tion li scias, mi ankaŭ.

Lian konsilon pri la enkonduko de novaj vortoj mi tiom pli volonte aprobas, ke mi donis ĝin jam tre ofte; sed la afero ne estas *ĉiam* tiel facila, kiel li kredas. Kiam post legado de multaj paĝoj nek Merckens, nek Berthelot, nek mi havis tradukon por vortoj *tutkomunaj* kiel : *astro*, *bukso*, *garolo*, *korniko*, *karno*, *kresto*, *mahagono*, *reĝedo*, *ripari*, *ktp.*, *ktp.*, ni

serĉis internacian radikon kaj ĝin ne trovinte elektis vorton proponotan kaj proponitan al D-ro Zamenhof; kial S-ro Bourlet ne montris tiam al ni, kie ni estus povintaj trovi ilin? Tion li scias, mi ankaŭ.

Tre certe eraroj sin trovas en ĉiuj niaj vortaroj. Ni devas peni por forigi ilin kaj atingi necesan samecon. Nin helpu la kritikistoj bonvolaj. *Kritikon ni ne timas, ĝin ni deziras kontraŭe*; nur la vortoj de **Universala vortaro**, kiel skribis D-ro Zamenhof, ne estas diskutablaj. Pri aliaj, *samaj en la diversaj naciaj vortaroj*, oni povas ankaŭ konsideri ilin, kiel akceptitaj de ĉiuj: tio estas jam *komuna fundamento*. Pri ceteraj oni povas diskuti.

Ni tamen ne estu tro severaj al kolegoj: perfekteco ne ekzistas sur tero, se ne eble *nur* en matematiko, ho karaj matematikistoj.

Tutkore via,

*Th. Cart.*



## Poŝta danĝero

Ĉar la afero estas iom grava por ni esperantistoj, mi esperas ke vi publikigos la sekvantan tradukon de letero kiun mi ricevis de la Ĝenerala Poŝta Oficejo de Londono:

Sinjoro,

Rilate al via persona demando al la suba poŝtestro de *Ramsey*, mi estas ordonita de la Poŝtestro Ĝenerala sciigi al vi, ke, laŭ la regularo de la Poŝta Unuiĝo, privataj kartoj difinitaj por internacia ĉirkaŭirado devas porti sur la adresflanko la titolon « *Carte postale* » aŭ ĝian ekvivalenton *en la lingvo de la lando de ilia deveno*. Kiam tiu ĉi regulo estas nezorgita, la kartoj estas klasataj kiel *leteroj*.

Tiu ĉi regulo ne estis zorgita en la okazo de la karto enmetita \*); kaj ĝi estis, tial, prave taksita kiel nesufiĉe antaŭpagita letero.

Akceptu, Sinjoro ... ktp.

Ne estas necese, ke mi aldonu komentarion; la letero klarigas sin mem.

EDWARD METCALFE

M. A. (Oxon)

\*) Ĝi havis nur la Esperantan surskribon « Poŝta karto ».

### Pri « adresi »

En L. I. junia oni petas klarigojn pri tiu vorto. Mi opinias ke ĝia fundamenta senco estas trovebla ĉe formon substantivan: t. e. « *adreso* »; ĝi signifas: skribajo sciiganta prezan loĝejon de l'ricevonto: nomojn, profesion, straton, numeron, urbon, landon, ĉion tion laŭ bezono. Se oni konsentas pri tia senco, ŝajnas ke « *adresi* » signifus nur: skribi adreson sur la sendotaĵon. Sekve, kiam mi « *adresas* » al vi leteron, mi estas ja « *adresanto* »; sed kial do « *vi* » estus la « *adresato* »?? — Mi ĝis nun opiniis ke « *vi* » estas nur « *ricevonto* »; ke la letero, kiun mi « *adresas* » al vi, estas al vi « *adresata* », kaj sola « *adresato* ».

Cetere, mi konsentas ke tiu vorto « *adresato* » estas iom dubsenca: pli kompreneble estus « *adresat'aj'o* »; oni tiel uzus la ricecon de nia lingvo por klare eldoni sian ideon. Kaj se, ian tagon, mi transsendus « *vin* » kvazaŭ pakajon, skribinte « *adreson* » sur vian dorson, mi tiam nomos vin: « *adresat'ul'o*. »

Mi kredas ke oni ofte uzas « *adresi* » anstataŭ « *sendi* »; tio estas tute ne ŝatinda, ĉar « *sendi* » havas propran sencon, tute sufiĉan por plenumi sian rolon.

— J. Coox.

## Problemoj

7. De H. M.-Deculo (solvota laŭ ĉevaliro)

Se	va-	ĉe-	es-	ni	ni-	ĉe-	gi-
val'!	tas	o-	ne	for,	ta	di-	ta
las	be.	kna-	vin',	Do-	la	Pa-	val',
la	for,	bo-	For,	val',	na	ĉi-	ras:
Ka-	to-	ĉe-	bin',	na	< pre-	Al-	ĝin,
for,	ko-	vin';	ne	bo-	gas	mi-	o
Pe-	bin'!	Jen	kal'!	e-	brust',	nu	lo-
lekt',	po-	lekt'>;	kna-	va-	Al	por	a

8.

(De Mi.)

Mi estas malbela besto. De tranĉu mian kapon kaj piedon: mi plimalbeliĝos kaj samtempe — ĉu ne strange? — pli grandigos.

9.

(De pdl.)

*ka ka ka, d*

La solvojn de tiuj ĉi problemoj ni presos en nia 7-a numero, kune kun la nomaro de la divenintoj.

Redaktoro (gérant): **Paul Frulotier**. Administranto-direktoro: **Paul de Longyel**.  
Presejo Esperantista, 33, Rue Lacépède, Paris.